

PRINCETON UNIVERSITY


*Per file*

LIBRARY

*B Fajon  
E.F.H*

# AMERIKA ESPERANTISTO

NOVEMBER, 1921



OFFICIAL ORGAN OF  
THE ESPERANTO ASSOCIATION  
OF NORTH AMERICA



# LEIPZIG-A SPECIMENFOIRO

FOIRO

POR TEKNIKO KAJ KONSTRUFAKO

Printempa Foiro 1922 de la 5<sup>a</sup> ĝis 11<sup>a</sup> de marto

Aŭtuna Foiro 1922 de la 27<sup>a</sup> de aŭgusto ĝis 2<sup>a</sup> de septembro

La centra merkato por la internacia  
komerco kaj ofertado

Same grava por ekspozantoj kaj por aĉetantoj

Informojn donas kaj aliĝojn akceptas

MESSAMT FÜR DIE MUSTERMESSEN  
IN LEIPZIG

(Foiroficejo por la Specimenfoiroj en Leipzig)

JOHANNES TZECHICHOLD • 1920-1921

Statement of the Ownership, Management, Circulation, Etc., required by the Act of Congress of August 24, 1912, of Amerika Esperantisto, published monthly at West Newton, Boston, Mass. for October, 1921.

Publisher, The Esperanto Ass'n of N. America  
Editor, Norman W. Frost, West Newton 65, Mass.

Owners: The Esperanto Association of North America; C. F. Bardorf, Pres., Montreal,

Que., Can.; J. J. Sussmuth, Vice-Pres., Union Hill, N. J.; B. Pickman Mann, Treas., Washington, D. C.; G. W. Lee, Sec., Boston, Mass.

No bonds or mortgages.

(signed) Norman W. Frost, Editor.

Sworn to and subscribed before me this 26th day of September, 1921.

Seal Joseph B. Ross, Notary Public.  
My commission expires October 7, 1927.

# Amerika Esperantisto

## American Esperantist

WEST NEWTON 65, MASS.

Subscriptions, etc. to Boston Office, redakcia adreso, 12 Ash St. Pl., Cambridge 38, Mass.

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

Published and distributed under permit No. 843 authorized by the Act of October 6, 1917, on file at the Post Office of Boston, Mass., By order of the President, Will H. Hays, Postmaster General.

One Dollar a Year.

Po Dudek Respond-Kuponoj aŭ Du Spesmiloj (Oraj) Jare.

Single Number 10 Cents.

Every article in this magazine (unless expressly excepted) may be translated or reprinted without further permission.

Published Monthly by

**THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA**

The Esperanto Office, Pierce Bldg., Copley Sq., Boston, Mass., Usono.

Vol. 29.

November, 1921.

No. 1.

### SCIENCE TAKES NOTICE

The French Association for the Advancement of the Sciences at its congress in Rouen in August, 1921, called upon all the other like associations to examine into and form a conviction as to the technical merits or demerits of Esperanto and do what they can to bring about action and inform public authorities of their attitude.

The Italian Society for the Promotion of the Sciences, the highest organization in that department in Italy, at its congress Sept. 8 to 15, 1921, in Trieste, voted a resolution requesting all students and authorities to encourage the spread of Esperanto, and chose a committee to compile facts upon the Esperanto movement and determine the best method of spreading it.

The British Association for the Advancement of Science, waking up in its turn, heard Sept. 9th the report of an unprejudiced committee of eleven at Edinburg University, which after making short work of Latin, and regretfully abandoning English, refused to decide between Esperanto and Ido. We have not received notice of the dispute, but we can guess that the Idists were sore at their fiasco at Vienna, where they had less than 150 compared to Esperanto's 2500 at Praha. Just one quotation from the British Committee's report (in the British E. for October).

“Although, by reason of its simpler grammar, a ‘working knowledge’ of English is more easily acquired than one of Latin for use as a second language neither can compare with Esperanto or Ido in this respect. With the object of testing the ease of acquirement of Esperanto, Professor J. J. Findlay has recently conducted an experiment with a class of secondary-school teachers at Manchester University, and his conclusions are, briefly, as follows:—(a) A practical knowledge of Esperanto can be acquired in a far shorter time than any natural speech, ancient or modern; three weeks of intensive study under a good instructor would enable a class of teachers to master the essentials and acquire a fluency which is seldom gained in French or German after twelve months’ study abroad. (b) Its construction secures the intellectual interest of the learner and invites him to go forward and complete the mastery.”

### LATE NEWS FROM PRAHA, ETC.

The subcongress of scientists decided that the Internacia Scienca Asocio be revived and an attempt made to get 500 subscribers and refound the Internacia Scienca Revuo. Oni atentigas per flugfolio la samideanaron al la danĝero de disfalo de Esperanto se unu scienca asocio ne reguligas la fakvortarojn. For the present they seek to collect all scientific Esperantists and organize their labors in sections to work out “fakvortarojn” to be sent to the L. K. Any scientist can help on the terminology. Upon the other hand there is propaganda to be undertaken especially with the national specialist magazines. The Scienca Revuo is necessary for meanwhile terminological articles appear in “the most obscure little magazines” (ekz. A. E. Ni dankas!) We cannot yet translate everything. The review will no longer be divided into departments for propaganda effect. The review will have four parts: propaganda, statistical, terminology, and question bureau. At least 440 more subscriptions are a prerequisite; memberships \$1.00, subscriptions \$2.00, subscription with membership \$2.50 (promises only as yet). Gifts also acceptable. Samideano Pratley, M. E. I. C., of 469 Clarke Ave., West Mount, Montreal, Canada, is the man for North Americans to write to.

All medical men should be interested in the reappearance of the Internacia Kuracista Revuo and in the Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio. If so write to Dr. Austerlitz, sekr. de TEKA, Bardiov, Slovakia.

In Olomuc, Czechoslovakia, the railroad administration with the approval of the Cs. Ministry of Railways, in a decree No. 0986 of Sept. 15, 1921, after thanking the Esperantist railway men for their efforts during the Congress, ordered that a knowledge of Esperanto shall give precedence in promotions, etc., to those proving a knowledge of Esperanto.

The subcongress of radicals at Praha decided to take unto themselves the title Sennacieca Asocio Tutmonda, so now they are rejoicing in the title of “Satanoj.” They decided that all relations with other “fi-burgaj” societies should be technical only.

The Budapest Postkongreso was a gratifying success after the threats of government hostility and the overcrowding at Praha. There was some delay with accommodations at Bratislava but at Budapest everything was in readiness. Even the new town hall flew an Esperanto banner. Salutes of twelve nations (150 present), poems, music, dramatics, and common sight-seeing and meals made this one round of delight.

The Sixth national congress of Italian Esperantists greeted the returning Praha-anoj at Triente August 16th to 18th. It was attended by many public officials. It was decided to transfer headquarters of the Italian Esperanto Federation to Venice and use L' Esperanto as the official organ.

The International Catholic Conference in Graz, Aug. 10 to 14, brought together 150 delegates with the salutations of 23 eminent church officials and the papal blessing. A resolution adopted calls for action for Catholicism among the Esperantists, and against the opposing united forces. Apparently the propaganda for Esperanto among Catholics is shelved or perhaps taken for granted.

The Fair of Praha, which occurred on September 1 to 8, installed an Esperanto Bureau and designated a special day as "Esperanto Day." Special railroad rates were given. Upon the basis of relations begun during the Thirteenth World Congress the Padua Fair suggested collective effort to which the Praha Fair assented. All relations will be carried on in Esperanto.

Praha is predominantly a market of glassware, porcelain, leather goods, machinery, and very many other things, not to forget Praha ham and Pilsen beer.

At the Fair of Lyons Mme. Farges had an Esperanto booth which gave out thousands of propaganda slips. On October 7th Prof. Antonelli spoke upon Esperanto before the Industrial, Commercial and Agricultural Association of Lyons as did Sec. Cherblanc of the Chamber of Commerce of Tarare, and the Association decided to make use of Esperanto.

The Leipzig Fair has set up an official Esperanto Bureau opening for Esperantists a special room all day long during fair time and providing guides.

---

W. Phila High School for Boys

I take great pleasure in certifying that Mr. Albert M. Koliner, 607 Breitmeyer Bldg., Detroit, Mich, passed his Supera Ekzam. with a mark of 92.5.

H. W. Hetzel,  
Chairman, Examinations Committee.

---

As chairman of the Publications Committee I have induced samideanoj G. P. Feree of New Llano, Leesville, La., and Ernesto E. Guerra of Tampico, Mexico, to help in the work or plans. Any recommendations for propaganda or other literature or suggestions as to content of the magazine should be submitted to this committee.

Norman W. Frost, 12 Ash St. Pl., Cambridge 38, Mass., Usona.

## GEMS OF ESPERANTO LITERATURE

## "POSTE RESTANTE"

(Rakonto de konvertito)

Nu, amiko, vi demandas, kio kaŭzis, ke mi tiel bone, tiel delikate kunvivadas kun mia edzino. Mi rakontos al vi sincere la aferon, sidigu komforte, volu ekfumi kaj aŭskultu.

Antaŭ du jaroj, en la karnavala tempo, mi legis la sekvantan anonceton en unu ĉiutaga gazeto:

"Kia bonkora viro volus reĝojigi velkantan koron de virino?

"Brulanta amo."

Vi scias, ke mi ĉiam estis granda amiko de aventuroj. Nu, atendu, —pensis mi,—mi reĝojigos vin!

La sekvantan tagon mi anoncis la jenan respondon:

"Al Brulanta amo.

"Forgesita 26-jara blondulo sentas la deziron resanigi vian doloratan koron. Volu skribi leteron sub la malsupra adreso poste restante.

"Fajra amo."

Tute kompreneble mi havis leteron en la sekvinta tago. Mi tuj rekonis la delikatan skribon de virino; mi eĉ vidis, ke la skribintino apartenas al la klerularo.

Rapide fariĝis inter ni varma, konfidencia korespondado. Ĉiutage mi interŝanĝis leteron kun la stranga nekonatulino, kiun mi jam tre deziris koni.

En letero mi petis ŝin, ke ŝi difinu lokon kaj tempon, kie kaj kiam ni povus renkonti unu la alian. Ŝi plenumis mian deziron, skribante, ke ŝi ĉeestos en la proksima maskobalo kun kostumo de husara leŭtenanto.

Tuj mi sciigis ŝin pri mia decido, ke mi ĉeestos en la balo, vestita kvazaŭ ĉevalisto hungara.

Malrapide alvenis la atendita tago. Mi tre ĝojis de la—espereble dolĉa—aventuro, kies efektivigon ĝenis nur unu cirkonstanco.

Kion mi diros al mia edzino? kien mi intencas iri?—Tio estis pikanta punkto.

Hop, antaŭen!

"Kara edzineto," diris mi timante, "hodiaŭ estas la nomtago de unu mia amiko; pardonu al mi, mi ne pasigos hodiaŭ la vesperon apud via amata flanko."

(Estis por mi feliĉe, ke ŝi ne demandis min pri la nomo de mia amiko, ĉar mi ja ne estas sperta pri la kalendaro.)

Kun ruza rideto ŝi donis al mi la forpermeson....

Post dek minutoj mi jam forestis,—post dudek jam kvazaŭ hungara ĉevalisto promenadis en la balsalono.

Mi malesperis jam la renkonton: le leŭtenanton de husaroj ne povis trovi miaj avidaj okuloj.

Sed mia malespero baldaŭ forflugis,—ŝi jen eniris la salono.

Unue mi sekvis ŝin en ŝatinda malproksimeco, poste mi komen- cis la interparolon.

## FOR THE STUDENT

"General Delivery"

(The Tale of a Convert.)

Well, friend, you ask how it comes that I always get along so fine and smoothly with my wife. I'll make a clean breast of it. Take a comfortable seat, please light up, and listen.

Two years ago, in carnival time I read the following little announcement in a certain daily paper:

"What kind man will restore a woman's withered heart?

"Burning Love."

You know I have always been a great friend of adventures. Just wait, thought I, I'll "restore" you!

The next day I published the following reply:

"To Burning Love: "

"A desolate twenty-six-year-old blond feels the desire to heal your aching heart. Please write a letter addressing it as below, general delivery.

"Fiery Love."

Just as might be supposed, I had a letter the next day. I at once recognized the delicate hand of a woman; I even saw that the writer belonged to the cultured class.

There rapidly developed between us a warm, confidential correspondence. Every day I exchanged a letter with the strange unknown, whom I now greatly desired to know.

In a letter I asked her to set a place and time where and when we might meet each other. She acceded to my desire, writing that she would attend the next fancy dress ball in the costume of a lieutenant of hussars.

I immediately informed her of my intention to attend the ball dressed like a Hungarian cavalryman.

Slowly the expected day approached. I looked forward with great delight to the presumably sweet adventure, whose realization was hampered by but one circumstance.

What was I to say to my wife? Where was I off to? This was the ticklish point.

Forward march!

"Dear wifey," I said timidly, "this is the christening anniversary of a friend of mine; forgive me if I fail to pass this evening at your beloved side."

(It was fortunate for me that she did not ask me the name of my friend; for I am far from expert in the calendar.)

With a cunning smile she gave me the furlough.

In ten minutes I was off,—in twenty, one in the likeness of an Hungarian horseman was sauntering thru the ball-room.

I despaired now of the meeting: the lieutenant of hussars did not greet my eager eyes.

But my despair soon flew away,—here she entered the hall.

At first I followed her at a respectful distance, then I began the conversation.

Senpacience mi atendis la paŭzan horon, kiu tre malrapide alvenis per testudaj paŝoj. Maltrankvile mi iris flanken kun mia koleginino por ŝin ekkoni. Sed,—je mia nekaŝebla surprizo,—ŝi petis min, ke mi konduku ŝin en mian loĝejon.

Vi povas kompreni, kara amiko, mian grandan embarason. Tamen mia cerbo estis jam preskaŭ tute konfuzita per nekonata sento; mi obeis.

Ni sidiĝis en fiakron.

La ĉambro de mia edzino estis peconigra. Ŝi dormis. Timante mi kondukis la leŭtenanton en mian apartan ĉambreton. Farinte lumon, mi petegis ŝin forĵeti la maskon.

Nun la bela leŭtenantino eltiris sian glavon kaj metis sin en minacantan pozon.

“Nu, kara ‘Fajra amo’! Malnobla, kanajla fripono!” diris ŝi laŭte.

“Ho ĉielo! tiu ĉi voĉo! tiu ĉi tono!... .

Subite ŝi forĵetis la maskon.

Imagu, amiko, kiu estis mia koleginino!—imagu. Mia edzino,—ĉu vi komprenas? mia edzino, jes edzino! Ŝi staris antaŭ mi kun la eltirita glavo, kiel punanta kerubo.

“Nu, juna deloganto! kiel plaĉas al vi la leŭtenanto?”

Pro la teruro mi ne povis paroli. Ŝi turnis sin kaj kun fieraj paŝoj forlasis la ĉambreton, kiel efektiva tragika aktorino.

La radioj de l’revenanta suno trovis en mia ĉambro malĝojan ĉevaliston, sidantan apud la tablo, apogantan la kapon sur siajn brakojn.

Ĉu vi ne estas scivola koni, kiel mia karega edzino estis diveninta mian aventuron? Tre simple.... Ŝi estis trovinta kaj leginta mian unuan leteron, kaj ŝi mem estis portinta ĝin el la poŝto. Mi korespondadis nesciante kun mia edzino.

Nun vi scias, kara amiko, kiel mi kunvivadas tiel bone, tiel delikate kun mia edzino. Ofte eĉ nun ni rememorigas unu la alian pri la rakontita aventuro; kaj tiam nia gaja rideo preskaŭ eksplodigas la domon.

El “Libro de l’Humoraĵo”

de Lengyel Pal.

#### Notes

“Poste restante,” a French phrase, which Kabe transliterates “poŝte restante.

**Volu:** we generally use **bonvolu** for “please,” but the shorter form is classical (F.K.23), clear, briefer, and worthy of wider use.—**karnavala tempo:** in Catholic countries the period of public gaiety from Twelfth Night to Ash Wednesday.—**ĉiutaga gazeto:** or, in one word, **ĵurnalo**. — **skribantino**. **konegino** .. **leŭtenantino:** apropos of these feminines, untranslatable in any natural tongue, we are reminded of Zamenhof’s dictum in F.K.295, “en lingvo arta estas ne ebla la ekzistado de ia vorto por unu sekso kaj neekzistado por la dua sekso.” — **klerularo:** **klera** (from Latin **clericus**) is one of the root-words whose choice by Zamenhof distinguishes his intuitive genius



Impatiently I awaited the hour of intermission, which approached very slowly with a snail's pace. With uneasiness I went aside with my partner, to make her acquaintance. But—to my unconcealable surprise, she asked me to conduct her to my residence.

You can understand, dear friend, my great embarrassment. Yet my brain was now almost entirely confounded with an unknown feeling; I obeyed.

We took our seat in a cab.

My wife's room was as black as pitch. She was asleep. With fear I conducted the lady lieutenant into my own little den. Making a light, I begged her to discard the mask.

Now the fair she-lieutenant drew her sword and threw herself into a menacing pose.

"Well, dear 'Fiery Love'! Ignoble, scoundrelly rogue!" said she aloud.

Heavens! this voice! this tone!

Suddenly she threw away her mask.

Imagine, friend, who was my partner!—imagine! **My wife**,—do you understand? my wife, yes, wife! She stood before me with the drawn sword, like an avenging angel.

"Well, young seducer! how do you like the lieutenant?"

I could not speak for terror. She turned on her heel and with proud steps left the den, like a veritable tragic actress.

The rays of the returning sun found in my den a sorrowful trooper sitting at the table, leaning his head on his arms.

Are you not curious to know how my precious wife had guessed my adventure? Very simply—she had found and read my first letter, and she had herself carried it from the post office. I had been corresponding unwittingly with my wife.

Now you know, dear friend, how I come to always get along so well and smoothly with my wife. Often even now we remind each other of the adventure I have just told; and then our gay roar of laughter almost bursts the house down.

By a Hungarian.

---

from the labored superficiality of a host of would-be imitators. Where every modern tongue uses a different word to express the idea, he declined to use any one of them, but chose a root in solution, as it were, in every modern tongue, conveying, in whatever combination, substantially the idea desired. Zamenhof strove for an "internationality" deeper than a mechanical picking of modern words. Esperanto etymology bears study, with a view to greater appreciation of the language. — **nekonatulino**: -ul- seems superfluous, but is a matter of usage (cp. **instruitulo**, "a scholar" (F. K. 64).) — **difinu**: this verb has several distinct meanings: (1) "to define" (give a definition of), as in Kabe's Vortaro; (2) "to appoint" (time, place, committee etc.), as F. K. 63, 263 and in the present place; (3) "to destine," as F. K. 273 (now often replaced by **destini**). — **Hop, antaŭen!** cp. Proverbaro Esperanta No. 241: **Ne diru "hop" antaŭ la salto.** — **edzineto**: -et- not infrequently has the force of the "pet-name" suffixes -ĉj- and -nj-.

— **nomtago**: this represents a family anniversary with which Americans are not familiar. — **unu mia amiko**: note the expression, “a friend of mine” (cp. **unu sian kolegon**, F.K. 83). — **ŝi jen eniris**: **jen** gives vividness to a phrase by implying a pointing gesture.—**testudaj paŝoj**: we translate “snail’s pace” to preserve English idiom, tho **testudo** is not a snail. — **pozo**, unlike **pozicio**, has a certain dramatic connotation. — **kanajla fripono**: it is interesting to try to differentiate closely synonymous words. The root **kanajl-** is but once used by Zamenhof (**kanajla**, **Rabistoj** 7) and but once by Kabe (**Fundo de l’ Mizero** 13); but **fripono** and derivatives are used many times by the two **Ĉefmajstroj**. The one seems to connote a knavery of brute force, the latter a knavery of deception. — **kerubo**: we hardly think of a “cherub” as a mighty avenger, yet Kabe defines him as “angelo de la plej alta ĉiela horo,” and, incidentally, that is how Milton classed him. — **deloĝanto**: **de-** has here the derogatory sense of **sub-** in **subaĉeti**. — **estis trovinta . . . Leĝinta . . . portinta**: the only compound tenses active in the selection: right below we have **korespondadis** rather than **estis korespondinta** (note the force, too, of **-ad-**: not “had corresponded” but “had been corresponding.”)

H. M. S.

### PRI DIPLOMATIA VORTARO

Rilate la terminojn en la Februara numero ni ricevis kelkajn korektojn kaj proponojn, el kiuj ni elektis jenajn:

**upstream, downstream**: pro eraro ni intermiksas la tradukojn donitajn en Millidge. Fakte **upstream = kontraŭflue**, **downstream = laŭflue**.

**to nominate**: ni erare alskribis **nominacii** al Millidge. La vera fonto estas Grosjean-Maupin. Plie Boirac donas ne **nominacii** sed **nominaci**. Oni atentinde proponas **kandidatigi**.

**Council**: anstataŭ **koncilio** oni proponas **koncilo**. Ŝajnas, ke tiu lasta formo tro facile miksiĝus (precipe en sono) kun **konsilo** kaj naskus konfuzon, pro parenceco de signifoj de la du vortoj. Ni notas, ke Fulcher and Long donas **koncilio**.

**to take into account**: krom la vortoj donitaj oni ankaŭ proponas **enkalkuli**. Tute bone; vd. FK 198.

**to repatriate**: oni proponas **enpatrujigi**. Pli logike estus **reenpatrujigi** (laŭ Fulcher and Long), sed anstataŭ analogie al naciaj vortoj tro pezaj kunmetaĵoj ni persone preferas ĉirkaŭfrazojn.

**If occasion arises**: la proponita traduko, **se sin prezentas okazo** ŝajnas tro laŭvorta, kaj estas ĉiam bone utiligi formojn “Esperantis-tajn,” t. e. la koncizajn esprimojn, kiujn diktas le ĝenerala uzado.

Sufiĉe grava sur la diplomatia kampo estas ĝusta elekto de landnoma sufikso. Mi tute ne konsentas kun kelkaj trofundamentistoj, ke la prova uzado de **-io** endanĝerigas la lingvon aŭ la propagandon; ĉar nia movado jam staras sur kruroj tro firmaj, por esti ŝancebla per filologiaj diskutoj aŭ atakoj. Cetere la Majstro mem en sia Antaŭparolo al la Fundamento de Esperanto (kiun verkon ni ĉiuj akceptas kvazaŭ nian “biblion”) absolute rekomendis kreskigadon de la

lingvo per vojo de neologismoj, uzotaj **paralele kun la formoj Fundamentaj, eĉ ĝis eventuala eksigo de la lastaj.**

Sed mi persone preferas la Fundamentan sufikson **-ujo** ol **-io** pro la jenaj motivoj:

(1) Nia Akademio ĝin rekomendas. Ĉu aŭtokrata aŭ demokrata, tiu anaro estas ĝis nun nia registaro en la lingva fako\*; kaj ĝis kiam la Esperantistaro anstataŭigos la nunan Akademion per Akademio alia, eble pli demokrata, mi preferas ian efektivan registaron ol anarhion. Cetere la membroj de nia Akademio estas ĉiuj tre kompetentaj Esperantistoj kaj per si mem individue atentindaj eĉ ekster sia oficiala rolo.

(2) Fonetike **-io** plivastigas la **akcentatajn I sonon**, da kiu nia lingvo jam nun havas sufiĉegon (precipe pro la akcentata silabo en la korelativoj, pronomoj kaj oftuzaj sufiksoj). Kompreneble ĉe vere praktika bezono oni ne atentu la fonetikon, estetikon aŭ belsonecon; sed **sen neceso** oni ne unutonigu la lingvon. (Ĉe **-ujo** ja l'akcento falas sur **-u-**.)

(3) Ŝajnas al mi malpraktika kaj kontraŭ la spirito de nia lingvo havi sufikson facile intermikseblan kun tre ofte aperanta **natura vortfiniĝo**, kiu jam pensigas pri sufikso kvankam ne sufikso. Oni ne malofte dubas, ĉu **-io** estas efektive sufikso aŭ natura finiĝo de landnomo. Prenu ekzemple frazon el gazeto "Esperanto" (No. 248, p. 3): "Ni citas la milojn da budhaj pastroj, abatoj kaj gvidantoj en Hindio, Tibetio, Ĉinio, Mongolio kaj Mandŝurio, en Siberio kaj eĉ en okcidenta Rusio." Ĝu el la supraj landnomoj **-o** estas sufikso kaj en kiuj natura radikfiniĝo? Pri almenaŭ tri el la landoj mi dubas, kvankam sufiĉe sperta Esperantisto. Kaj dezirante formi el la landnomoj la popolnomojn, oni hezitas, ĉu uzi la simplan radikon (analogie je **ruso**) aŭ **-ano** (analogie je **Siberiano**). Dume se la verkinto estus uzinta **-ujo** kiel sufikson, tiam la sufiksaj kaj sensufiksaj landoj starus nete distingitaj kaj malaperus ĉia dubo.

(4) Kiel ajn mi rompas al mi la kapon, mi tute ne komprenas la **utilon anstataŭi** la Fundamentan sufikson **-uj-** ĉe landnomoj. Oni pretendas ja, ke la sufikso estas trisenca—kun sencoj (1) de arbo, (2) de lando, (3) de simpla entenilo. Sed jam la uzado elstrekis ĉe **-uj-** la unuan sencon, anstataŭ kiu oni nun kutime uzas **-arbo** (se la simpla radiko ne sufiĉas). Restas la sencoj dua kaj tria. Sed ĉu iu povas serioze pretendi, ke ekzistas eĉ la plej malgranda danĝero de miksiĝo inter, ekzemple, **Rusujo** kaj **supujo**? La timo estas pure akademia. Cetere, eĉ se estus efektiva embaraso ĉe la du sencoj de **-ujo**, certe estus multe pli prudente, elekti novan sufikson por la tre, tre malofte aperanta "entenilo"-senca, ol por la jam de longe traplektita kun la tuta literaturo senca de "lando."

H. M. S.

---

\* "En 1908 la Lingva Komitato.....starigis E. Akademion de 18 anoj, kies devo estas esplori la demandojn submetitajn al la L. K., kaj formuli decidojn laŭ la opinioj kolektitaj pri tiuj demandoj ĉe la lingvokomitatoj." p. 23, Of. Gaz. Sept., 1921.

## LA SEKRETO DE L'ARTISTO

Foje vivis artisto, kaj li pentris unu pentraĵon. Aliaj artistoj pentris per koloriloj pli efektigaj kaj pli malordinaraj; kaj faris pentraĵojn pli farindaj\*. Li pentris la sian per unu kolorilo, miriga ruĝa lumeto elstaris el ĝi, kaj la amaso aliris al ĝi kaj foriris dirante, "La pentraĵo plaĉas al ni, ni ŝatas la ellumeton pri\* ĝi."

La aliaj artistoj venis kaj diris: "De kie li haviĝas\* sian kolorilon?" Ili tion demandis al li, kaj li ridetis kaj respondis, "Tion mi ne povas diri al vi," kaj li daŭrigis la laboron kun la kapo mallevitena\*.

Kaj unu forvojaĝis al la malproksima Oriento kaj aĉetis multekostajn pigmentojn kaj elfaris malordinaran kolorilon kaj pentris per ĝi, sed post tempon\* la pentraĵo fariĝis alikolora.

Alia artisto tralegis el malnovaj libroj kaj elfaris kolorilon efektigan kaj malordinaran, sed kiam per ĝi li pentris ĝi estis neviviga\*.

Sed la artisto ade pentris. Ĉiam la verko aperigis pli kaj pli ruga, kaj la artisto fariĝis pli kaj pli blankhaŭtulo\*. Fine unu tagon, oni lin trovis senviva antaŭ lia pentraĵo, kaj oni lin forportis por lin entombigi.

La aliaj elserĉis en ĉiujn potojn kaj kolormiksulojn, sed nenion ili trovis kion\* ili mem ne havis.

Kaj kiam ili senvestigis lin por lin tombvestigi, ili ektrovis super la maldekstra brusto la postsignon de vundo—estis malnova, tre malnova vundo, kiun li devis\* esti portanta dum sia tuta vivo, ĉar ĝiaj randoj estis malfreŝaj kaj malmoliĝintaj, sed La Morto, kiu ĉiujn aferojn seligas\* kunetirigis ĝiajn randojn kaj ilin fermigis.

Kaj ili\* enterigis lin, kaj ja ankoraŭ la amaso iradis kaj diris, "De kie li haviĝis sian kolorilon?"

Kaj okazis ke post tempon la artisto estis forgesita—sed la verko vivigadis\*.

Tradukis Alphonse B. Durocher,  
297 Workman St., Montreal, Canada.

famindajn, or famajn—The artist made them, but he did not make them famous.

de—concerns source.

haviĝas sian—I like this for its logic better than the customary havigas al si, but why not use akiri?

mallevita.

post tempo(n).

neviv(ig)a? or neviceca.

blank()ulo, or pala.

kiun—relates to nenion.

konstateble estis—devis would signify ought to or had to.

sigelas.

oni?

viv()adis suffices.

Altho another translation contained fewer errors this one seemed best to convey the spirit of the semi-poetic story. We are delighted that so many competed and hope the interest will continue. If return postage is sent we will gladly send back the translations with brief notes.

### TRANSLATE

When China began in 1911 to build a government she did not have words in her language that stood for a republican form of government. Get that into your mind. We had the ideals to give her, but she did not have the words to express these ideals. Moreover, she has a cumbersome language that takes bright men years to learn. Even Dr. Ward, bright as he is, couldn't learn it in less than ten years and there are some words he did not know when he got through.

Dr. Martin has been in China for sixty-six years. In a long conversation he confessed to me he never wrote a letter in the Chinese language. Said he: "I always keep my writer and I always keep my teacher. I am always studying the Chinese language." What would you think if you kept at it for sixty-six years and then when you got through with it were not able to trust yourself to write a letter to any official in the Chinese language but had to hire somebody to do it for you. That visualizes to you the impossibility of the Chinese language.

---

### PAROLEJO

In but not about Esperanto | not over 500 words | free to all | signature and address required  
 En sed ne pri Esperanto | ne pli ol 500 vortoj | por iu senpage | nomo kaj adreso postulataj  
 (The editors express neither approval nor disapproval of statements under this head, the facts are on the authority of the person named. Not open for any articles upon Esperanto subjects proper.)

---

**Send donations for the Monument** to Dr. Zamenhof to W. M. Page, 31 Queen St., Edinburg, Scotland.

---

Skoltoj Esperantistaj bonvole notu la adreson de la nova sekretario de la Skolta Esperantista Ligo, al kiu oni devas sendi komunikojn pri skoltaferoj esperantistaj.

Norman Booth, Netherton, Huddersfield, Anglujo.

---

La Luterana Enmigrant-Societo, 208 61st Street, New York City, Usono sendas (nur kontraŭ stampita respond kupono) gvidfolion al intencintaj enmigrintoj, el kiu ni ĉerpas:

### I — ENMIGRANT-INSULO AŬ TENDEJO

Vojaĝantoj de la I a kaj II a ŝipklaso, se nenio nuligas ilian enlason, estas elŝipigitaj je la doko de la transoceanaj kompanioj kaj devas iri al urbaj hoteloj kaj zorgi pri si mem. — Sed vojaĝantoj de la III a ŝipklaso (interferdeko) ne estas permesataj eniri la urbon. Ili estas elŝipigitaj je la estrara enmigrant-insulo "Ellis Island (ajland)", kie estas la estrara oficejoj kaj protektantaj tendejoj por ili. Kiam la enketo montris, ke ili povas esti permesataj enlande, ili estas eskortataj al la fervojejo kaj estas transportataj al iliaj destinaj lokoj enlanden.

## II. — FERVOJOJ

Sciu, ke vojaĝantoj de la III a ŝipklaso devas aŭ aĉeti ilian fervojan bileton kune kun la ŝipa bileto aŭ havi kaj montri en "Ellis Island" la bezonatan monon—(kvazaŭ ilia propra posedajo)—por tiu bileto. Krom tio la estraro demandas ĉu ili havas minimume 25\$00 da plua kontanta mono, antaŭ ol oni allasas ilin enlande.

## III. — GRAVAJ SCIIGOJ—(LEĜOJ, KTP)

(1) Dum la estanta tempo la vojaĝkostoj estas tre altaj, ne nur transmare sed ankaŭ translande en Usono. Krom tio la Usonaj leĝoj pri enlaso de enmigrantoj estas pli severaj ol antaŭ la milito, kaj ili estas sekvataj tre precize.

(2) Dum unu jaro la Usona estraro permesas el iu ajn lando nur tiun nombron da enmigrantoj, kiu respondas je 3% de la anoj el sama lando, kiuj dumjare 1910 loĝadis tie en Usono. Oni nepre ne permesas pli ol tiun leĝe fiksitan nombron da personoj dum unu jaro.

(3) La Usona estraro nepre ne permesas enlason de tiuj personoj: homoj sen lerneja edukado, anarkistoj, krimuloj aŭ malmoraluloj el alia lando, idiotoj, frenezuloj, homoj kiuj havas nekuraceblajn aŭ naŭzemajn malsanojn, homoj kiuj verŝajne iutempe fariĝus financa ŝarĝo por tiu ĉi lando, homoj, kiuj sin kontrakte dungis por certa laboro antaŭ ilia elmigro el antaŭa hejmo.—Sed oni ne konstruas je simpla promeso de parencoj aŭ amikoj en Usono, ke ili volos laŭpove helpi al la enmigranto por baldaŭ trovi laboron, kvazaŭ je antaŭa labora kontrakto.

(4) Eble ne ĉiuokaze malpermesata, sed ĉiam tre malfacila estas la enlaso de tiuj personoj: maljunuloj, malfortuloj kaj kripluloj, senmonaj vidvinoj kune kun neplenaĝaj infanoj, homoj kiuj ne mem posedas la vojaĝan monon kaj kiuj ne povas montri la bezonatan fervojan monon kune kun 25\$00 kontanta plua mono, infanoj pli junaj ol 16-jaraj, kies gepatroj ne loĝas en Usono, ktp. Kiam la estraro escepte permesas enlason en jenaj kazoj, estas necese, ke parencoj aŭ amikoj en Usono laŭleĝe estas devigataj subteni tiujn personojn, se necese, ĝis ilia morto.

(5) Tiuj, al kiuj oni ne permesas allason enlande, estos retransportataj al ilia patrolando aŭ antaŭa hejmlando. Same tiuj, kiuj kondiĉe estis enlasitaj kaj poste fariĝis financa ŝarĝo por tiu lando, ili estos retransportataj.

## PRESS NOTICE

The Evening Capitol and Maryland Gazette for Oct. 8., "World Congress of Esperanto held in Prague successful."

Malfrue oni anoncas al ni la morton pasintan Februaron de S-ino John Amsel el North Wales, Pa., dum longaj jaroj fervora kaj helpema subtenanto de Esperanto en Ameriko.

## KRONIKO AMERIKA

**Tampico, Mexico.**—Edziĝis Okt. 15an S-ro Ernesto E. Guerra, kun Mathilde Jaquel el Mulhouse, Alsacio. Ili esperas kune daŭrigi laboron por Esperanto. Ili nun entuziasmigas la moskitojn.

**Ie en Usono.**—Okt. 4. ni Bostonanoj havis la plezuron renkonti Gesinjorojn Cornish el S. Leandro, Kalifornio dum vizito bedaŭrinde tre mallonga ĉar ili forvojaĝis en

## La Domo sur la Rulantaj Radoj

Estas ja mirinde, kiam oni pripensas la luksojn postulatajn de modernaj domloĝantoj, ke tia komforto kaj ĝojo povas veni al veturanta familio el nur malgranda rulanta domo sur radoj. "Kompreneble, nur la radoj rulas—la radoj sub la aŭtomobilo—Dodge." Ni ĝojis pro la privilegio viziti tiun konstruaĵon, starantan en ombraja anguleto de vojo. Sur la du flankoj de la antaŭa parto de la domo estas pordoj por en- kaj el-iron. Interne je la malantaŭaĵo troviĝas kuŝejo kie nokte fariĝas lito. Enhavas seĝojn, rulseĝojn, faldantan seĝon, similspecan tablon, lavpelon, petrolforneton kaj ŝrankon plenigitan. En unu angulo troviĝas vestujo de virino, kaj rekte antaŭ veturista seĝo vestujo de viro—ambaŭ sufiĉe larĝaj. Sur la ĉi tia pendas spegulo kiun oni ankaŭ uzas por rigardi eksteren tra la fenestro kion okazas malantaŭe dum vojaĝo. Inter la ŝirmitaj fenestroj pendas aliaj tri ŝranketoj enhavantaj diversajn bezonaĵojn. Haltu. pensu! Kian Gojon! Kiel rapide rapide aranĝata! La domo iras kien oni deziras, rulanta sur radoj—ne, sur rulantaj radoj. (E. Ohman.)

**Milwaukee, Wisc.**—Edziĝis S-ro C. H. Gibbons el Boone, Iowa, kun F-ino Ella C. Sievers.

**Weehawken, N. J.**—Mardon, la 11an dtm., la Hudson County Esperanto Society havis sian ĉiumonatan kunvenon, dum kiu okazis jara elekto de la direktoraro. Jen la elektitaj: S-ro J. J. Sussmuth, prez.; S-ro H. Messmer, vicprez.; G. Poropat, kas.; S-ro E. Viedt, kor. sek.; S-ino L. Nagel, raporta sek.; S-ro H. Schichtel, libraristo.

Jenaj gazetoj raportis pri la kunesto: Hudson Dispatch, Hudson Observer, Hudson News, New Jersey Post.

La societo havos sian amuzan vespereton ĉiun duan semajnon por esperanta ekzercado, kantado, amuzado, ktp. La unuan fojon, tia kunveno troviĝos je 123 Parkview Av., Weehawken, N. J. jaŭdon, la 20an dtm.

**New York, N. Y.**—Staats-Zietung, ĉefa germana gazeto de Novjorko, ekkomencigis interesan debaton pri la temo: "La dua lingvo." Inter la diversaj artikoloj aperis du kiuj proponis Esperanton, unu de J. J. Sussmuth, la alia de F. H. Jerome. Pluajn proponojn oni atendas.

**Spar Creek, Md.**—Rev. James L. Smiley kaj F-ino E. W. Weems vizitis la hejmon de S-ino G. W. Moss, por tie paroladi al gastoj pri Esperanto.

**San Francisco, Calif.**—Kurso ĉiulunda je Sta. Clara Hall, 414 Mason St., S. F.

—Sept. 23an F-ino Van Sloun paroladis ĉe Bahaja kunsido pri Internaciaj Lingvoj kaj Esperanto.

—S-ino Grace Hilgers vizitas gepatrojn en Chicago.

**Niagara Falls, Ont., Can.**—Nin vizitis Ges. Cornish 5. Sept. per aŭtomobilo ambaŭ loĝejo kaj veturilo. Jen ili priskribas tutan Amerikon viditan:

Oakland, bona loko—Sacramento, varmega—Placerville, malnova—Lago Tahoe, belega—Carson City, ne malbona—Fallon, malbonaj vojoj—Austin, malnova minejo—Elko, 150 m. senhomaj—Twin Falls, bela valo—Idaho Falls, kun amikoj—Flavŝtona Parko, multe da naturaj vidindaĵoj—Montana, longaj vojoj—La “Malbonaj Landoj,” tre interesa—S. W. N. Dakota, supren kaj malsupren—S. E. N. Dakota, ebenajo kun tritiko—Minnesota, parksimila, multe da lagoj—Minneapolis kaj St. Paul, interesaj—Wisconsin, bela fruktodona tero—Milwaukee, preskaŭ tute seka—Chicago, diversajoj laŭ loko: belega, malbona, malpura, bonega, malluma, kaj mirinda—Ill., prospera—Indiana, bona—Ohio, bela laŭ L. Erie—Cleveland, progresema—Buffalo, agema—Niagara Falls, belega, renkonto kun Ges. Parrish.

**Bostono.**—25 ĉeestis la barĉon kvinsabatan kaj multe ĝuis la festenon. S-ro Lee anoncis la kurson de D-ro Lowell kiu komencos Nov. 8an, kaj dek aliĝis. Tri anoj de la Frost-Lee klasoj, S-ro Frankel, S-ro Wight, kaj S-ino Kenty, pruvis sian spertecon per paroladoj. Oni eklumfotografis la ĉeestantaron. Oni anoncis ke se oni forŝtelas sufiĉe plu da niaj seĝoj ni devas sidi sur planko.

**Diversaj urboj.**—Eĉ ne respondis la poŝtkartojn al ili senditajn.

### WORLD NEWS OF ESPERANTO

In Honan at the Kajfen Women's Normal School Esperanto has been made one of the elective studies.

Esperanto has been adopted by Nuremburg, Germany, for its Commercial High Schools.

Tallin, Esthonia, reports great interest, nine courses with over 300 students and the members of “La Espero” increased from 77 to 272. Every week 40 to 60 members meet. Courses also at Haapsalu, Narva, Tartu, Vaike maarja, and Voru.

In Bulgaria the Students Abstinence League and the Vegetarians in their last congresses urged that all members learn Esperanto.

The Third Congress of World Brotherhood, meeting at Praha about the last of August, decided to use Esperanto for their correspondence in non-English lands and recommend classes in all lands.

The directorate of academic courses of Essen, Germany have put Esperanto upon their list of courses for the coming winter.

Under the lead of S-ro Sevenhuijsen arrangements were made by which 400 sickly German children were taken into Holland to recuperate.

In the Seminary of Girona, Spain, an Esperanto group has been revived. It has now 40 members and two courses.

The Ministry of the Interior, Saxony, has given permission to policemen passing the G. E. A. Esperanto examination to wear upon their sleeve-wrist a cloth Esperanto star.



## EXECUTIVE COMMITTEE REPORT

New York, N. Y., Oct. 30, 1921.

Fellow-Esperantists:—

An arrangement has been concluded with the Esperanto Service Corporation, which is expected to result in a considerable number of new subscribers to **Amerika Esperantisto**. This will mean increased influence for our organ and greater strength for our organization. Even making full allowance for extreme optimism, the plans of the new corporation are of such a nature that their success must not only benefit Esperanto in general, but must contribute in particular to the growth of E. A. N. A. Under these conditions, we can do no otherwise than hope that the expectations of its supporters will not be disappointed.

A most interesting report has been received from one of the cities seeking the next Congress. There is still plenty of time to hear from others; but too long a delay is inadvisable. Remember that after the beginning of January it will be too late.

Are all readers of this magazine members of E. A. N. A.? If not, why hold back? With a strong organization, we can do great things for Esperanto in this country. The opportunities were never so great; but the means must be provided for effective work. If you can afford to chip in a little extra, or to take one of the higher classes of membership, now is the time when this assistance will be of the greatest value. Let us make E. A. N. A. the largest and strongest Esperanto organization in the world. Why not?

Fraternally yours,

James F. Morton, Jr.,

Chairman of the Executive Committee.

## EDITORIAL MEDITATIONS

A. E. receives every year, often from non-subscribers and non-members, communications asking that we publish appeals for help sent to them. We realize that in many cases—as where the appeal reaches us directly—this cry of an individual for help is wrung from him by suffering perhaps even by the menace of death. Financially, however, *Amerika Esperantisto* is not in a position to donate the room for appeals for help to individuals. Our space is already crowded. We are trying to publish a magazine with “an appeal” both to the Esperantist and to the outsider; it is essential for the very existence of A. E. that our space be not given to individuals, but used to keep Esperanto alive in America. For that reason, we ask those who have petitions for help (to individuals) to forward, that they boil them down to two or three lines, and send to the *deziras korespondi* column—run approximately at cost—with the money therefor.

*Literaturo*, July-Sept., has a very interesting article on the Chinook jargon by Mark Gilbert amid other valuable features.

Ho ve! Jen ni ricevis Esperantidu! Denun oni devos inventi novan vokalon por ankoraŭ definitive plibonigi la Esperantida-e-i-o-u lingvon.

# AMERIKA ESPERANTISTO

OFFICIAL ORGAN of

The Esperanto Association of North America, Inc.

a propaganda organization for the furtherance of the study and use of the International Auxiliary Language, Esperanto.

Yearly Memberships: Regular \$1.00; Contributing \$3.00; Sustaining \$10.00; Life Members \$100.

CO-EDITORS: NORMAN W. FROST

H. M. SCOTT

MRS. I. M. HORN

## CLUB DIRECTORY

This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor.

### BERKELEY, CALIF.

Berkeleya Esperanta Rondo.—Classes Monday and Tuesday evenings at 8.00.—Meetings Thursday evenings at 2508 Vine St. Address Vinton Smith, 530 62nd St., Oakland, Calif.

### OAKLAND, CALIF.

Oakland Esperanta-Rondo; L. D. Stockton, Bibliotekisto, 420 15th St.

### SAN FRANCISCO, CALIF.

San Francisco Esperanto Rondo; meets second Monday eve., 414 Mason St., Santa Clara Hall. F-ino Evelyn M. Rosher, 125a Beulah St. Kalifornia Esperantista Rondaro meets first Tuesday evenings, Room 121 Chronicle Bldg., San Francisco. M. D. Van Sloun, Secy., 946 Central Ave.

### MONTREAL, CANADA.

Montreal Esperanto Association meets each Tuesday and Thursday at 8.15 P. M. in Room 13, The Tooke Bldg., Sec., Miss E. Strachan.

Esperanto meetings every Saturday evening at 8 P. M. at 20 Selkirk Ave. ALL are welcome.

### TORONTO, CANADA.

The Toronto Esperanto Club meets every Saturday at 7 P. M. at the Friends' Meeting House, cor. Maitland & Jarvis Sts. Sec., E. M. Gundy, 173 Spadina Road.

### WASHINGTON, D. C.

La Kabea Esperanto Klubo meets every Wednesday, at 8.30 P. M., at the Thomson School, XIth and L Sts., N. W. Sin turnu al B. P. M., 1918 Sunderland Place.

Kolumbia Esperanto Asocio. Public meeting third Wednesday of each month, 8.30 P. M., XIth and L Sts., N. W. Free class at 7.30 P. M. every Wednesday, same address.

### CHICAGO ILLS.

La Gradata Esperanto-Societo, Dvorak Park. Jaroslavi Sobehrad, Sec'y, 5625 23rd Rd., Cicero, Ill.

La Esp. Oficejo. 1669 Blue Island Ave. Kunvenas 2an kaj 4an sab. ĉiumonate. 19

### BOSTON, MASS.

Boston Esp. Soc., 507 Pierce Bldg., Copley Sq. Meets Tues., 7 P. M. Miss A. Patten, Sec.

### WORCESTER, MASS.

Worcester County Esperanto Society. Business Institute, every Friday, 8.00 P. M.

### PORTLAND, ME.

Portland Esperanto Society, Mrs. E. C. Flint, Sec., 16 Sherman St.

Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the two-line insertion. Extra lines are 10 cents each additional. The heading,—name of city or town—is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club secretary. Group Charter—\$1.00.

### DETROIT, MICH.

Detroit Esperanto Office, 507 Breitmeyer Bldg., open daily. Library at disposal of everybody daily, 7 A.M.-9 P.M., except Tues. and Fri. Classes meet Tues. and Fri., 8.10 P. M.

La Pola Esperanto Asocio, 1507 E. Canfield Ave. B. Lendo, Sek. 3596—29th St.

### HEBRON, NEBRASKA.

La Hebrona Grupo kunvenas ĉiun Ĵaŭdon 8 P. M., 660 Olive Ave., kaj ĉiun Dimanĉon 10 A. M., 500 Olive Ave. Roland Jeffery, Pres., Harry Hogrefe, Vice-Pres.

### HOBOKEN, N. J.

"I.O.O.F. Esperanto Club No. 1 of Greater N.Y." meets every Tuesday at 8.30 P. M. in 61 First St., 3rd Floor West. All welcome. Pres., Mrs. M. O. Haugland; Sec'y Wm. Preusse; Instructor, A. Mendelson. Address all communications to the secretary at above address.

### NEW YORK CITY, N. Y.

The New York Esperanto Society, Miss L. F. Stoeppler, Sec., 105 West 94th St. The Barĉo, or Esperanto Supper, is held on the fourth Sunday of each month 6.45 P. M. at Hotel Endicott, 81st St. and Columbus Av.

La dimanĉa kunveno, al kiu ĉiuj estas bonvenaj, okazas je la tria horo, posttagmeze, ĉiun dimanĉon, ĉe la loĝejo de S-ro Joseph Silbernig, 229 East 18th St., Manhattan.

### CLEVELAND, OHIO.

La Zamenhofs Klubo; S. Kosminski, Sek., 3406 Meyer Ave.

### ERIE, PA.

La Pola Studenta Societo, Prof. E. Bobrowski, ing., St. John Kanty College eldonas ½-jaran ĵurnalon, "La Studento," jara abono \$1.00.

### PHILADELPHIA, PA.

Phila. Esp. Soc. Miss Marie Knowlan, cor. Sec., 1420 18th St. Meets 4th Fri., Hotel Hanover, 12th and Arch Sts.

Rondeto de Litovaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.

Esperanta stelo de Polujo. Sekr., S. Zysk. Kunvenas mardon vespere inter 8-10 h., 507 N. York Ave. 19

### PITTSBURGH, PA.

Esperanto Sec., Academy of Science and Art. J. D. Hailman, Sec., 310 S. Lang Ave. Fridays, 8 P. M.

### MILWAUKEE, WISC.

Hesperus Esperantista. S-ino B. H. Kerner, Sek., 629 Summit Av., 3d Tuesdays, 8 P. M. 19